



**Esperanto
Societo
Frankfurto**

marto 2014

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main e.V.
gegründet 1904 – fondita 1904

ESPERANTO INFORMILO

Esperanto-
Gesellschaft
Frankfurt am Main

www.esperanto-frankfurt.de

1. Vorsitzende:
Katarina Eckstädt
Geschwister-Scholl-
Str. 1
63486 Bruchköbel
Tel. 06181 76343,
e-mail:
ke.esperanto@t-online.de

Bankverbindung:
Esperanto-Gesell-
schaft Frankfurt /M.
IBAN: DE75 5008 0000
0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
Commerzbank
Frankfurt/Main

Beitrag:
mit DEB-Beitrag
80 €
Familienmitgl. 40 €
Nur ESF: 20 €
Familienmitglied
10 €



foto:ke

Ho bele, esti juna

Ho bele, esti juna
en nokto freŝe blovan,
stari sub mildo luna,
sin senti ĉionpova,
konscii senson flaran,
atendi sian karan...

William Auld: „Kvaropo“

einladung zum klubabend

invito al la klubvespero

Bürgertreff Bockenheim
Schwälmer Str 28
Frankfurt am Main

donnerstag, d. 6.3.2014

ĵaŭdon, la 6an de marto 2014

Liebe Mitglieder, Freunde und Interessenten,
wir laden Sie zum nächsten Klubabend ein, der am Donnerstag, den **6. 3. 2014** stattfinden wird.

Karaj membroj, geamikoj kaj interesiĝantoj,
ni invitas vin al la venonta klubvespero, kiu okazos ĵaŭdon, la **6an de marto 2014**.

18.30 h

sprachrunde

lingva rondo

dusencaj kunmetaĵoj

Ĉu vi havis jam problemojn kompreni iujn kunmetitajn vortojn? Tio povas okazi se vi la kunmetaĵon malbone dividas. Ekzemple: termino aŭ ter-mino aŭ sen-tema aŭ sent-ema. S-ro Pflüger trovis multajn tiajn vortojn kaj li prezentos ilin al ni.

Reinhard Pflüger

19.30 h

wir reisten nach...

ni vojaĝis al...

Unsere Mitglieder reisen oft zu verschiedenen Esperanto-Veranstaltungen und -Festen.
Sie werden uns heute darüber berichten.

Niaj membroj vojaĝas ofte al diversaj Esperanto-okazintaĵoj kaj festoj. Ili raportos al ni pri siaj impresoj kaj montros al ni fotojn.



H. Stecay

Castellaro

F. Reisel...

Donnerstag, den 20. 03. 2014 um

19 Uhr

Mitgliederversammlung

Tagesordnung

- 01 Begrüßung und Feststellung der Beschlussfähigkeit
02. Findung eines Protokollanten
03. Annahme der Tagesordnung
04. Genehmigung des Protokolls der letzten Mitgliederversammlung
05. Tätigkeitsbericht der ersten Vorsitzenden
06. Finanzbericht des Rechnungsführers
07. Bericht der Beisitzerin Gisela Stoessel über die Bücherei
08. Bericht der Kassenprüfer
09. Diskussion über die Berichte
10. Entlastung des Vorstandes
- 11 Wahl des Vorstandes
 - 11a Wahl der Wahlleitung
 - 11b Wahl eines neuen Vorstandes
12. Wahl eines neuen Kassenprüfers
13. Vorträge (Wir bitten um Vorschläge für Vorträge und Sprachrunden)
- 14 Ausflug (Wir erwarten Vorschläge über Ort und Zeit)
15. Sommerfest
16. Anträge
17. Verschiedenes

Anträge der Mitglieder bitte bis zum 5. März an die Vorsitzende Katarina Eckstädt schicken. Die Post- und Internetadresse können sie auf der ersten Seite dieses EI finden. Wir bitten die Mitglieder, zahlreich an der Mitgliederversammlung teilzunehmen. Es ist wichtig, über unsere Arbeit zu diskutieren, unsere Abende zu gestalten.

Nicht vergessen!

Zur Mitgliederversammlung kommen

geburtstage im märz

naskiĝtagoj en marto

Gisela Beckmann, 04.03.
Walter Ullmann, 06.03.
Elfriede Kruse, 13.03.1914.
Bernhard Westerhoff, 30.03.

ni gratulas!

Mi dankas...

al ĉiuj kiuj skribis al mia interretadreso aŭ telefonis al mi kaj deziris al mi bonan resaniĝon.
Mi troviĝas sur la resaniĝvojo.

Katarina Eckstädt

Herr Ulrich Matthias hat uns folgende Information gesendet:

Hallo Katarina,
die folgende kostenlose Veranstaltung am 7. Mai 2014 in Frankfurt dürfte für Esperantisten interessant sein. Vielleicht kannst Du sie ja im EI ankündigen.
Aufaktveranstaltung
Frankfurter HausGespräche 2014 zum Thema »Nach Babel – Sprache und Sprachen?«
»Eine Sprache für alle? Vor- und Nachteile der Verkehrssprache und der Sprachenvielfalt«

Am Mittwoch, 7. Mai 2014, 19.30 Uhr

Frankfurter Goethe-Haus/Freies Deutsches Hochstift, Großer Hirschgraben 23-25, Frankfurt

Eintritt frei.

Weitere Infos: <http://www.frankfurter-buergerstiftung.de/node/1303>

Einer der Referenten, Michael Gahler, MdEP, hat sich oft kritisch über Esperanto geäußert:

<http://forum.vds-ev.de/viewtopic.php?TopicID=1418>

Viele Grüße

Ulrich

Im Internet kann man untenstehende Information finden:

Frankfurter Goethe-Haus/Freies Deutsches Hochstift, Großer Hirschgraben 23-25, Frankfurt

In der biblischen Geschichte des Turmbaus zu Babel kommt die Vielfalt der Sprachen einer Strafe gleich. Aber ist die Sprachenvielfalt nicht auch ein Reichtum? Oder behindert sie unsere globale Verständigung und ist daher eher von Nachteil? Sind die verschiedenen Sprachen ein Korsett unseres Denkens oder beflügeln sie unseren Geist? Und kann eine immer größere Spezialisierung des Wissens überhaupt noch in einer Allgemeinsprache vermittelt werden oder fallen auch die einzelnen Sprachen auseinander? Diesen Fragen gehen die »HausGespräche 2014« nach.

In der Auftaktveranstaltung geht es in erster Linie um den Stand der Nationalsprachen und der internationalen Verkehrssprache(n). Worin liegen die Vorteile grenzüberschreitender Sprachen, in europäischer und globaler Perspektive? Wie stark ist der Vereinheitlichungsdruck in Richtung einer weltweiten Verkehrssprache? Und was macht andererseits die Besonderheit und Widerständigkeit der Nationalsprachen und auch der Regionalsprachen aus? Wie steht es schließlich um das Verhältnis von Sprache und Identität? Die Referenten kommen aus Sprach- und Sozialwissenschaften sowie aus der Politik.

Begrüßung und Einführung: Clemens Greve, Prof. Dr. Annegret Bohnenkamp-Renken.

Moderation: Dr. Roland Kaehlbrandt

Referenten: Prof. Jürgen Trabant, Professor of European Plurilingualism, Jacobs University Bremen und Michael Gahler, Mitglied des Europäischen Parlaments (CDU)

Die weiteren Veranstaltungen der Frankfurter HausGespräche finden statt am 14. Mai 2014 im Literaturhaus und am 21. Mai 2014 im Haus am Dom.

Die Reihe Frankfurter HausGespräche 2014 wird veranstaltet von: Frankfurter Bürgerstiftung, Frankfurter Goethe-Haus/ Freies Deutsches Hochstift, Haus am Dom, Literaturhaus Frankfurt und Stiftung Polytechnische Gesellschaft Frankfurt am Main.

Wir bitten unsere Mitglieder an der Veranstaltung teilzunehmen.

La kafejo en Surat

Daŭrigo el la februara El:
(Transfariĝite laŭ Bernardin-de-St-Pierre.)

Tiam ekparolis mastro de egipta ŝipo, kiu tie ankaŭ sin trovis:

“Ne,” li diris, “tio ĉi ankaŭ estas malvero, la suno ne estas Dio kaj ne iras sole ĉirkaŭ Hindujo kaj ĝia ora monto. Mi multe ŝipadis sur la Nigra maro, laŭ la bordoj de Arabujo, mi estis ankaŭ sur Madagaskaro kaj ankaŭ sur la insuloj Filipinaj, — la suno lumigas ĉiujn landojn, ne solan Hindujon, ĝi ne iras ĉirkaŭ unu monto, sed ĝi levigas ĉe la insuloj de Japanujo, kaj tial ankaŭ tiuj ĉi insuloj estas nomataj Japen, t. e. — en ilia lingvo — naskiĝejo de la suno, kaj ĝi kuŝiĝas malproksime, malproksime en la okcidento, post la insuloj de Anglujo. Mi tion ĉi bone scias, ĉar mi mem multe vidis kaj mi ankaŭ multe aŭdis de mia avo. Kaj mia avo ŝipadis ĝis la finoj mem de la maro.”

Li volis ankoraŭ paroli, sed angla ŝipsoldato de nia ŝipo interrompis lin:

“Ne ekzistas lando krom Anglujo”, li diris, “kie oni pli bone scius pri tio, kiel la suno iras. La suno — ni ĉiuj tion ĉi scias en Anglujo — nenie leviĝas kaj nenie malleviĝas. Sed ĝi iradas sencese ĉirkaŭ la tero. Ni tion ĉi bone scias, ĉar ni mem Jen ĵus ĉirkaŭveturis la tutan teron kaj nenie ni atingis la sunon. Ĉie ĝi, tiel same kiel tie ĉi, matene montriĝas kaj vespere sin kaŝas.”

Kaj la anglo prenis bastonon, desegnis sur la sablo rondon kaj komencis klarigadi, kiel la suno iras tra la ĉielo ĉirkaŭ la tero. Sed li ne povis bone klarigi, kaj, montrinte la direktiston de sia ŝipo, li diris:

“Li cetere estas pli saĝa ol mi, kaj li pli bone tion ĉi al vi klarigos.”

La direktisto estis homo prudenta kaj aŭskultis la interparolon silente, dum oni lin ne demandis. Sed nun, kiam ĉiuj sin turnis al li, li komencis paroli kaj diris:

“Ĉiuj vi trompas unu alian kaj ankaŭ vin mem. La suno ne turnas sin ĉirkaŭ la tero, sed la tero sin turnas ĉirkaŭ la suno kaj ankoraŭ mem sin turnas, elmetante kontraŭ la suno en la daŭro de dudek kvar horoj tiel Japanujon, kiel ankaŭ la insulojn Filipinajn, kaj ankaŭ Sumatron, sur kiu ni sidas, kaj Afrikon, kaj Eŭropon, kaj Azion, kaj multon ankoraŭ da aliaj landoj. La suno lumas ne por unu sola monto, ne por unu insulo, ne por unu maro kaj eĉ ne por unu tero, sed por

multaj tiaj samaj planedoj, kiel la tero. Ĉion tion ĉi ĉiu el vi povus kompreni, se li rigardadus supren al la ĉielo kaj ne malsupren al siaj piedoj kaj ne pensus, ke la suno lumas nur por li sola aŭ por lia patrujo sole.”

Tiel diris la saĝa direktisto, kiu multe veturis tra la mondo kaj multe rigardadis supren al la ĉielo.

„Jes, la eraroj kaj malkonsentoj de la homoj en la afero de religio venas de memamo“, daŭrigis la ĥino, lernanto de Konfucio. “Kio estas kun la suno, tio sama estas kun Dio. Ĉiu homo volas, ke li havu sian propran Dion, aŭ almenaŭ Dion de sia hejma lando. Ĉiu popolo volas fermi en sia sanktejo Tiun, kiun ampleksi ne povas la tuta mondo. Kaj ĉu povas ia sanktejo kompari sin kun tiu sanktejo, kiun konstruis Dio mem, por unuigi en ĝi ĉiujn homojn en unu religion, en unu kredon? Ĉiuj homaj temploj estas faritaj laŭ la modelo de tiu ĉi templo — la mondo de Dio. En ĉiuj temploj sin trovas lavujoj, arkaĵoj, sanktaj lampoj, sanktaj figuroj, surskriboj, libroj de legoj, oferoj, altaroj kaj pastroj. En kia do templo sin trovas tia lavujo kiel la oceano, tia arkaĵo kiel la arkaĵo ĉiela, tiaj lumiloj kiel la suno, luno kaj steloj, tiaj figuroj kiel vivaj homoj reciproke amantaj kaj helpantaj unu alian? Kie sin trovas surskriboj pri la boneco de Dio tiom same kompreneblaj kiel tiuj bonfaroj, kiuj ĉie estas disĵetitaj de Dio por la feliĉo de la homoj? Kie estas tia libro de leĝoj, kiu estus tiel klara al ĉiu kiel tiu libro, kiu estas skribita en lia koro ? Kie estas oferoj similaj al tiuj sinmemoferoj, kiujn amantaj homoj alportas al siaj proksimuloj? Kaj kie estas altaro simila al la koro de bona homo, sur kiu Dio mem akceptas oferon? Ju pli alte homo komprenos Dion, tiom pli bone li Lin konos. Kaj ju pli bone li konos Dion, des pli multe li proksimiĝados al Li, imitados Lian bonecon, kompatemecon kaj amon al la homoj. Kaj tial tiu, kiu vidas la tutan lumon de la suno plenigantan la mondon, ne kondamnu kaj ne malestimu tiun superstiĉan homon, kiu en sia idolo vidas nur unu radion de tiu sama lumo; li ne malestimu ankaŭ tiun nekredanton, kiu blindigis kaj tute ne vidas lumon.*

Tiel diris la ĥino, lernanto de Konfucio, kaj ĉiuj, kiuj estis en la kafejo eksilentis kaj ne disputis plu pri tio, kies religio estas pli bona.

Rimarkigo:

Karaj legantoj,

legante la artikolon de Tolstoj ni rimarkis kelkajn vortojn kiujn ni ne plu uzas tiel aŭ mi eĉ uzas iun vorton por esprimi ion alian. Mi lasis la tekston tiel kiel ĝin skribis Tolstoj. Ĝi ja estas ĉe ni nur zitaĵo.

Ĉi tie kelkaj ekzemploj: Tolstoj uzas la vorton misionero, hodiaŭ ni diras misiulo, abesinaj – abisenaj, lamoj – lamaoj (lamo estas besto), izmaelidoj – ismailanoj ktp.. Por la vorto Devo (ĥinduisma Dio) mi ne trovis la vorton en PIV-o, devo estas substantivo de la vorto devi.

Tial estas ĉi tiu artikolo ankaŭ interesa. Nia lingvo evoluiĝas!

ke

wer möchte haben?**kiu deziras havi?**

Herr Ullmann hat einige Esperanto-Zeitschriften, die er gerne abgeben möchte. Wer interessiert ist kann sich bei ihm melden:

Walter Ullmann

Im Mühlfeld 69 a

61169 Friedberg

Tel. – Fax 06031 4617

Eine Zustellung kann erfolgen, auch Abholung ist möglich nach vorheriger Verständigung. Letzter Termin: 31.03.2014

S-ro Ullmann posedas Esperanto-revuojn kiujn li volonte donacus al aliaj esperantistoj. Ĉi tie estas adreso por interesiĝantoj:

Walter Ullmann

Im Mühlfeld 69 a

61169 Friedberg

Tel. – Fax 06031 4617

Enmanigo estas ebla kiel ankaŭ veni por preni ilin post antaŭa interkomprenado. La lasta mendotago: 31.03.2014

ESPERANTO aktuell

1992: 1 – 8; **1993:** 2 – 8; **1994:** 1 - 8; **1995:** 4 – 6, 8 **1996:** 5, 6, 8; **1998:** 1 - 8; **1999:** 1 – 8; **2000:** 1 - 3, 5, 6; **2001:** 1 - 3, 5, 6; **2002:** 5; **2004:** 1 - 6 **2005:** 1 – 6.

HEROLDO:

1979: 6,13; **1980:** 16; **1981:** 7, 9, 16; **1982:** 9; **1983:** 13; **1986:** 16; **1987:** 1 - 10; **1988:** 3-12; **1989:** 10 – 16; **1990:** 1 – 16; **1991:** 1 – 16; **1992:** 1 – 3, 8 – 16; **1993:** 1 – 14, 16; **1994:** 1 – 10, 14; **1995:** 1 – 16; **1996:** 1 – 13, 15 – 16; **1997:** 1 – 16; **1998:** 1 – 6, 8 - 16; **1999:** 1 – 16; **2000:** 1 – 16; **2001:** 1 – 10, 12-14, 16,17; **2002:** 1 – 17; **2003:** 2 – 18; **2004:** 1 – 4, 9 – 17.

ESPERANTO (UEA):

1979: 6, 10; **1981:** 5 – 9; **1982:** 2; **1983:** 7 – 10; **1984:** 1, 5, 6; **1987:** 1 – 7; **1988:** 3, 5; **1989:** 7 – 9, 11 – 12; **1990:** 1 – 12; **1991:** 1 – 12; **1992:** 1 – 10, 12; **1993:** 1 – 11; **1994:** 1 – 7, 10 – 12; **1995:** 1 – 12; **1996:** 1 – 12; **1997:** 1 – 12; **1998:** 1 – 11; **1999:** 1 – 12; **2000:** 1 - 9, 11 – 12; **2001:** 1 – 4, 6 – 12; **2002:** 1 – 12; **2003:** 1 – 12; **2004:** 1 – 3, 9-12;

HUNGARA FERVOJISTA MONDO:

1989: 3, 4; **1991:** 2, 3, 4; **1992:** 1 - 3 **1993:** 2 – 4; **1994:** 3; **1995:** 2 – 3.

EVENTOJ:

1992: 01, 15; **1994:** 45 – 47, 52, 67, **1995:** 89 – 92; **1996:** 93 – 105, 107 – 109, 112 - 115; **1997:** 117, 118; **1998:** 140 – 150, 152 – 156, 158; **1999:** 160; **2001:** 213;

ĉe ni en februaro**Germana premiero de „Albaniva kaj ŝiaj ses nanoj“ de s-ro G. Silfer**

Ne atendite ni ricevis proponon de s-ro Giorgio Silfer prezenti ĉe ni sian kamiŝibajan fabelon „Albaniva kaj ŝiaj ses nanoj“. Ĝi estas unua kamiŝibaja fabelo verkita originale en Esperanto. Kamiŝbaja teatro estas japana paperteatro prezentanta surstrate. Ĉiu prezentanto posedas lignan keston kasteledon en kiu estas bildoj. La aktoro rakontas fabelon kaj montras la bildojn en la kasteledo.

Estas interese, ke s-ro Silfer enkondukis du novajn vortojn en Esperanto: kamiŝbaja kaj kasteledo.

La vespero estis tre interesa. Ĝi estis tre bone vizitata.

Vidu la paĝon 8

„Albaniva kaj ŝiaj ses nanoj“



S-ro Giorgio Silfer kun kverkaj lignopecoj kiuj atentigas stratopasantojn, ke aktoro prezentos fabelon en sia kamiŝbaja teatro.



La unua bildo de la fabelo montras Albaniva-n. La ligna kesto estas kasteledo. fermita ĝi aspektas kiel leterkoverto.



Albaniva kun kolombo



La princo



Nanoj

← Fino

